

ESPERANTO

★ TRIUMFANTA ★

Publikigilo de multaj gravaj esperantistaj organizaĵoj.

Aperas semajne. — Senpagaj monataj aldonoj: „Internacia Komerc“ kaj „Revuo“ (literatura, populara).

Protaktantoj:

D-o Leono Zamenhof, Warszawa
W.M. Page, advokato, Edinburgh
Ernest Archdeacon, Paris
I Gilj Norta, komercisto,
Barcelona

H. Fischer, grandindustriisto,
București

Frans Schoofs, Antwerpen
P. v. Medem, bank- kaj fabrik-
direktoro, Kaunas.

N-o 196
15. 6. 1924

Redakcio:

Cefredaktoro: Teo Jung.
Redaktoro: Robert Kreuz.
Redakciaj kunlaborantoj:
H. Jung kaj M. Butin, L. K.

Administracio:

Horrem b. Köln, Germanlando

Abonprezo

po numero egalvaloro de 0,06 dolaro
aŭ 0,30 sv. fl. por landoj, kies valuto
suficis maksimume 80%; por ĉiuj aliaj
landoj 0,05 dol. aŭ 0,25 sv. fl.

Abonprezo

po kvadrata-centimetro egalvaloro de
0,20 sv. fl. (ĉe antaŭa pago 0,15 sv. fl.),
en „Internacia Komerc“ la duoblo.

Antwerpen, Barcelona, București, Edinburgh, Horrem, Kaunas, Paris, Warszawa

X. Internaciaj Floraj Ludoj Vich. Verdikto.

Ordinaraj temoj.

Originalaj tekstoj.

I. *Originala versaĵo kantanta Amon.* Premio al verko n-o 91, devizo: „Milda brulo“. Unua honora mencio: n-o 123, devizo „Amo, animo de l' mondo“. Dua honora mencio: n-o 6, devizo „Jam premiita“. Tria honora mencio: n-o 61, devizo „Por gekatalunoj“. Kvara honora mencio: n-o 88, devizo „Infana ĝojo“.

La „Natura Floro“ estas aljugata al la verko n-o 91, devizo „Milda brulo“.

II. *Originala Ama verko en prozo.* Premio n-o 30, devizo „Remember“. Unua mencio: n-o 96, devizo „Fundamentano“.

Tradukitaj tekstoj.

I. *Traduko de la kataluna versaĵo „Visions de Catedral“.* Premio: n-o 130, devizo „En spirita pilgrimado“.

II. *Traduko de la kataluna prozaĵo „El gorgo blanc“.* Premio: n-o 119, devizo „Ĉu ‚gurgo‘ aŭ ‚gorgo‘?“

Eksterordinaraj temoj.

I. *Originala verko.* La premio estas dividita en 4 partojn kaj aljugata al la 4 verkoj: n-o 24, devizo „Pacemo“; n-o 14, devizo „Nur mortinte mi ĉesu flegadi mian ĝardenon“; n-o 13, devizo „La steloj ne bruas“; n-o 77, devizo „Etienne“.

II. *La Katolikismo kaj la Paco.* Premio: n-o 26, devizo „Katolikismo kaj Paco“.

III. *Tradukitaj prozaĵoj (Unua grupo).* Premio: n-o 132, devizo „Trans la vivo“. Unua mencio: n-o 80, devizo „Lia filmo“. Dua mencio: n-o 109, devizo „La Virgulino kiel kavaliro“. Tria mencio: n-o 125, devizo „Fantazio“.

IV. *Originalaj versaĵoj.* Premio: n-o 92, devizo „Infane“. Unua mencio: n-o 86, devizo „Hej, Lola!“ Dua mencio: n-o 21, devizo „Mondon lumigas — Verda la stelo“. Tria mencio: n-o 90, devizo „Infera kavaliro“. Kvara mencio: n-o 144, devizo „Jam matenas“. Kvinna mencio: n-o 10, devizo „Antaŭen al la bon! Antaŭen al la bel!“

V. *Tradukitaj versaĵoj.* La premio estas dividita en 2 partojn kaj aljugante al la 2 verkoj: n-o 136, devizo „Placi al ĉiuj neniu sukcesis“; n-o 4, devizo „Legendo bela“. Unua mencio: n-o 12, devizo „Batalado, sed por paco kaj amo“. Dua mencio: n-o 7, devizo „Aŭburno“. Tria mencio: n-o 41, devizo „Pacon sur la tero“. Kvara mencio: n-o 142, devizo „Preterru“.

VI. *Originalaj prozaĵoj.* (Unua grupo) Premio: n-o 34, deviza „Neniu ŝiono perdis“ kaj titolita „Tjuda“. Unua mencio: n-o 128, devizo „Indulga — sed justa“. Dua mencio: n-o 116, devizo „La kverka skio“. Tria mencio: n-o 38, devizo „Se junaĝo sciis — se grandaĝo povus“. Kvara mencio: n-o 76, devizo „Mi restos fidela“.

VII. *Traduko el la kataluna poeto Verdguer.* Premio: n-o 126, devizo „Per rozoj Aŭror“ ilin kronas“.

VIII. *Originala teatraĵo aŭ novelo.* La premio estas dividita en 2 partojn: unu por teatraĵo, alia por novelo. Premio por teatraĵo: n-o 53, devizo „Procede et semper, Italia, semper!“ Premio por novelo: n-o 48, devizo „Bonis placuisse maxima laus est“. Unua mencio: n-o 83, devizo „Lonjo“. Dua mencio: n-o 52, devizo „Tannhäuser“. Tria mencio: n-o 86, devizo „Regu vin mem, sentinte mian doloron!“ Kvara mencio: n-o 11, devizo „Ad Augusta per Angustia“. Kvinna mencio: n-o 59, devizo „Kie estas homo, kiu ne mensogas?“

IX. *La amo al la birdoj.* Premio: n-o 134, devizo „Mi amas la birdojn“. Unua mencio: n-o

57, devizo „Pasero kaj najtingalo“. Dua mencio: n-o 27, devizo „Gaja svato“.

X. *Bonhumora versaĵo.* Premio: n-o 1, devizo „Goja momento“.

XI. *Tradukitaj prozaĵoj (Dua grupo).* La premio estas dividita en 2 partojn kaj aljugata al la 2 verkoj: n-o 78, devizo „Eloeo“; n-o 107, devizo „Kardi' iradas tra l' arbar“; Unua mencio: n-o 133, devizo „Malfruemulo“. Dua mencio: n-o 82, devizo „La krimulo“. Tria mencio: n-o 103, devizo „Polverejo“.

XII. *Lingvistika studo.* Premio: n-o 135, devizo „Ĉu ni ne venkos en decida hor?“

XIII. *Sciencaj verkoj.* Premio: n-o 129, devizo „Kiel inter la floroj ekzistas helaj kaj malhelaj, bonodoraj kaj senodoraj, belaj kaj — nur utilaj, tiel en la Floraj Ludoj apud la Poezio trovi lokon ankaŭ ĝia serioza fratrio: la Scienco“. Unua mencio: n-o 59, devizo „Sterkadu“.

XIV. *Kio plej impresis min dum mia vivo“.* Premio: n-o 43, devizo „La filo perdita“. Unua mencio: n-o 32, devizo „Homo sum, nihil humani me alienum est“.

XV. *Tradukitaj prozaĵoj (Tria grupo).* Premio: n-o 5, devizo „Rozoj, amo, pio: Bela harmonio!“ Unua mencio: n-o 79, devizo „Donna Liza“. Dua mencio: n-o 118, devizo „Ave Maria“. Tria mencio: n-o 81, devizo „La kulpo de Judaso“. Kvara mencio: n-o 104, devizo „La Virgulino kaj la diablo“. Kvinna mencio: n-o 58, devizo „Amo kaj Naturo ĉarmas min“.

XVI. *Studo pri la kataluna lingvo.* Premio: n-o 139, devizo „Non si ama e si difende men la patria con la horza della lingua che con quella della pada“.

XVII. *Folkloro-legendoj.* Premio: n-o 18, devizo „Ŝatanto de l' alta kaj ideala ĉe la popoloj“. Unua mencio: n-o 29, devizo „Kristnaska meso en la kapelo de Monteto“. Dua mencio: n-o 16, devizo „Ŝlosita pord' katenas min“. Tria mencio: n-o 28, devizo „La Folto de Leonardo da Vinĉi“. Kvara mencio: n-o 97, devizo „Enterigitaj trezoroj“.

XVIII. *Humoraĵoj.* Premio: n-o 115, devizo „Gajnu la mondon per gaja ridado“. Unua mencio: n-o 75, devizo „Ridu“. Dua mencio: n-o 40, devizo „Unufojulo“.

XIX. *Literaturaj studoj.* Premio: n-o 15, devizo „Kutimo estas dua naturo“. Unua mencio: n-o 46, devizo „Homo havas ankaŭ spiritajn bezonojn“.

XX. *Originalaj prozaĵoj (Dua grupo).* Premio: n-o 55, devizo „Obstine antaŭen!“ Unua mencio: n-o 31, devizo „Mizero kaj espero“. Dua mencio: n-o 145, devizo „Homa sorto“. Tria mencio: n-o 114, devizo „Feliĉa sonĝo“. Kvara mencio: n-o 84, devizo „Viko“.

Laŭ la regulo II de la regularo de la konservantaro de Floraj Ludoj, kaj ankaŭ laŭ la naŭa noto de la „Alvoko“, la premiataj aŭ menciitaj verkoj fariĝas propraĵo dum unua jaro de la Komitato de la Floraj Ludoj, kiu zorgos pri ilia publikigo sur „Kataluna Esperantisto“ aŭ „Literatura Mondo“. Permeson por reprodukto dum tiu unua jaro oni devas peti de la sekretario. Neplenumado de tiu kondiĉo malebligas partoprenon en postaj konkursoj.

La Festo de la X. Internaciaj Floraj Ludoj okazos kun hela soleno en la Teatro de Vich la 9 junio 1924, dum la XI. Kongreso de Kataluna Esperantista Federacio.

Majo 1924. Th. Cart, prezidento. Julio Baghy. Jacinto Bremón. Jacinto Comella. Estanislau Pellicer. Jaime Grau Casas, sekretario.

La esp. poeto premiita per la Natura Floro estas s-o D-o Koloman de Kalocsay, Budapest kaj la Reĝino estas f-ino Montserrat Terricabras Fatjo, filino de bona esperantisto D-o J. M. Terricabras, Vich.

Franca Esperantista Kongreso Strasbourg.

Nur post forsendo de speciala numero pri Wien ni sciigis, ke la Franca Esperantista Kongreso ne okazos kiel sciigite antaŭe dum pentekosto nunjara, sed nur dum la tagoj de 2 ĝis 4 aŭgusto. Pluajn detalojn ĝustatempe forsendos la kongresna komitato.

Socia Vivo.

Provoj por libera labor-komunumo

P. N. Stojnov.

El bulgara lingvo tradukita de Dimitr Feuer.

Daŭrigo (komp. ET 189.)

Sed tiu ĉi libera, komuna vivo, en kiu la scienco kaj la krea forto, la amo kaj la solidareco, estas komplemento unu al alia — ne estas ripetado de la malnovo. Tio estas sekvado de la provoj de la estinteco. Tio estas la eterna aspirado al plia belo, al plia perfekteco. Ĝi ne estas la religia ekzaltado de certaj religiaj sektoj en la estinteco. Ne estas same la mezepokaj komunumoj enfermitaj en si. Ne estas fine tiu granda kunvivado komunume de l' duhoboroj, tiel surprizanta per sia senaŭtoritata ordo, per sia vera komunisma vivo, kiun ni tragarados ĉi malsupre pli vaste, sed kiu tamen ankoraŭ portas la postsignojn de mistikismo, kvankam la tendenco estas al pli granda materia bonstato kaj al pli libera kompreno de l' vivo.

Kia estas la vera fizionomio de l' komunumo de la estonteco. Kompare kun tiu de la nuntempo kaj de la estinteco — tio dependas de la evo'uo de l' morala vivo, de la evoluo de l' sociaj interrilatoj kaj fine tio dependas same de l' grado de la scienco kaj kultura progresoj. Ĉiokaze ĝi estos io pli perfekta ol la hodiaŭa kaj ol la pasinta — ĉi tio estas nerefutebla.

El la provoj, faritaj kiel en la pasinteco tiel same nun, provoj pozitivaj, ni povas eltiri firme kaj definitive nian konkludon: la libera komunismo ne estas nur revolo, — ĝi estas efektivegbla, ĉar ĝi havas siajn provojn. En sia bazo ĝi estas neŝancelebla. Kvankam ankoraŭ nur provo, sufiĉe neperfekta kaj nekompleta, ĝi entenas la du pozitivajn faktorojn por la socia vivo: multe pli grandan materian bonstato'n ol ĉe la private-propra reĝimo, f. e. panon, kontentecon, liberan tempon por spirita plisuperigo, kaj aliflanke — liberecon, ĉe kiu la persono atingas sian vivon de kreado kaj originaleco. Tio estas sufiĉa argumento, eltirita el la provo, el la vivo, kiel kontraŭ la defendantoj de la privata propraĵo, „kiu sole estas faktoro de l' progreso“, tiel same kontraŭ la porŝtatitaj komunistoj, teoriigantaj kaj kultigantaj la „proletarian ŝtaton“ — „savon de la laborantoj“.

Ne, oni trovas la veran vojon.

Tio, kion ni prezentos kiel ekzemplon de tiu ĉi tendenco al vera kompreno de l' vivo, ne estas vanaj vortoj, — tio estas la vivo mem.

En tiu ĉi artikolo mi priskribos koncize*) la socian kaj spiritan vivon de la duhoboroj — „la plei granda en la mondo komunisma organizaĵo“, por esprimi per la vortoj de Tugan-Baranovski. Plue mi donos ekzemplojn ankaŭ el aliaj komunumoj.

Pri la vivo de l' duhoboroj oni malmulton scias, precipe de kiam la atento de l' homoj estis aldirita aliflanke dum kelkaj jaroj iam. Tio estas rusa religia sekto, preskaŭ proksima al la toŝtoĵismo**) laŭ siaj religiaj konceptoj. Ĝi ajn, fidele al sia doktrino pri amo inter la homoj, nekontraŭstare al la malbono per forto k. c. estis malbone traktata, persekutata de l' rusa carismo, ĉefe pro ilia rifuzo por militservo. Granda parto

*) Pli detale pri la vivo de l' duhoboroj, kiel same pri aliaj provoj por komunuma vivo vidu la libron de Tugan-Baranovski (ruso). „En serĉoj por la nova mondo“.

**) Ruse — „duhobóri“ — spiritbatajntoj (rim. trad.)

tie espluatitaj en 1913 uncoj (po 31,3 gr.) 12700, 1917: 50000, 1918: 25000, 1922: 6000. La unuan lokon anstataŭ Ruslando nun okupas Kolombio, kiu liveris en 1918 uncojn: 35000. En 1921 la platenamaso tie produktita jam sumiĝis je 40000 uncoj. Plibonigante la ilaron oni multe pligrandigos ĉi tiun amason. Kolombion sekvas vice Nov-Zelando, kiu produktis en 1920 uncojn 2000, poste Kanado nombrinte en 1922 uncojn 500, Japanujo en 1921 uncojn 251. Sed la platenprovizoj de Kanado estas multe pli grandaj ol supozigas la kvanto produktita, ĉar ĝi eksportas tre multajn minajojn el kiuj oni eksterlande espluatas platenojn. Per tio la platenproduktado de Kanado plialtiĝas por 1921 je uncoj 7700. Usono en 1922 liveris 929 uncojn da platenoj.

D-o Fr., München.

Zoologio.

La rapideco de bestoj.

Angla zoologo faris vicon da esploradoj kaj observadoj, kiuj celas konstati la rapidecon de unuopaj bestoj. Se ĉiuj kvarpeduloj de la kreitaĵo povus esti influataj fari verkuron, la unua premio apenaŭ evitigas la graĥundon (bigelon), kies rapideco ofte superas 1250 metrojn por minuto. Plej proksime al ĝi venas la ĉevalo kun 1160 metroj, la ĝirafo kun 900 m., la tigro kun 860, la rangifero kun 850 m, la lupo kun 570 m, la leporo kun 400 m. — En la flugilhava mondo estas la leterkolombo, kiu tenas la rapidecordon por 1200 m por minuto. Post li sekvas plej proksime la albatroso, kiu nur malmulte postrestas malantaŭ de ĉi tiu rekordo. Kio konceras la fiŝojn, kiujn la angla zoologo ankaŭ aludas por komparo, estas la delfino, kiu senpene trakuras pohore 31 kilometrojn.

La salmo tranaĝas 27 km, la harengo 28 km kaj la mezon en la rapideco spite de sia malgracia korporoformo kaj longeco havas la baleno, kiu atingas 25 km pohore.

Radio.

Radioparolado en Frankfurt a. M.

Merkredo 18 junio 19 1/2 horo okazos radioparolado de s-o Rob. Kreuz, redaktoro de ET, pri Rondradio kaj Esperanto-praktiko en germana lingvo kun kelkaj vortoj en Esperanto al la eksterlandaj amikoj. (Ondolongo 467 m.) De la sukceso dependas grava decido de la stacio. Aŭskultontoj en ĉiuj landoj skribu tujpri la aŭdrezulto al s-o D-o Flesch, Südwestdeutsche Rundfunkdienst A. G., Frankfurt a. M., Elbestraße 52.

Tekniko.

Skribmaŝin-tekniko.

En la angla revuo Children's Newspaper oni vidis bildon pri kurioza skribmaŝino de la Japana Ambasadejo en London. Konate estas, ke la japana lingvo posedas por ĉiu vorto apartan signon. Tial la skribmaŝino posedas 2450 signojn kaj du oficistoj estas bezonataj por skribi sur ĝi.

J.M.

Rapida kinematografo.

Mr. Grylls en London konstruis fotoaparaton, kiu kapablas fari 300000 fotojn dum sekundo. Per apliko de tia aparato ni povas klare vidi la plej etajn detalojn de saltanta homo aŭ ekbatita pilko. Ĉe la lasta la elekticaj leĝoj estas bone kontroleblaj. Guma pilko ekz. estas interesoplena objekto por tia observo. La formoŝanĝoj, kiuj okazas ĉe la puŝigo al muro estas fakte mirindaj.

J.M.

Razado per sunradio.

El Bradford venas sciigo, ke Melbourne IIman, la konata sportisto, kiu antaŭ kelkaj jaroj akiris al si „Campion“, titolon de l' mondo en internacia biliard-konkurso, — faris interesan eltrovon mortigantan la razisto-industrion Melbourne IIman eltrovis specialan razaparaton, kies sekreto konsistas en tio, ke la sunradioj, — trazitaj prismon kun certa refrakto, — malhelpas la kreskon de barbo kaj superfluigas la razadon.

Jen la deklaro de la eltrovinto:

Mia eltrovaĵo baziĝas sur la apliko de la ĝenerale konata rimedo kosmetika, uzita de la sinjorfrizistoj ĉe la forigo de ĝenaj hareroj. Ĝis nun neniu pensis pri tio, ke la sama maniero estas aplikenda ankaŭ ĉe la razado. Post multaj eksperimentoj mi sukcesis eltrovi la manieron tiom efikantan sur la vizaĝo, ke oni neniam plu devas sin submeti al la razado. La tuta afero estas simpla kaj ĝi daŭras nur kvin minutojn. Mi estas konvinkita, ke la raza tempo tiom taŭgos, ke post kelka tempo la razilo, kiel iu malaktualaĵo en muzeon. La suno transprenas la rolon de la razisto kaj la tralmigolo anstataŭos la sadumon kaj similajn torturojn. — Mi klopodas „demokratigi“ mian maŝinon, vendante ĝin mal-kare, por igi ĝin acetebila por ĉiu homo.

R.R. București.

Rimarko de la Red. Tre interesata afero. Esperinde oni baldaŭ eltrovas alian sunman procedon por facile malaperi ne taŭgajn partojn kaj erarojn en plej parte maltaŭgaj aŭ maltaŭge aranĝitaj manuskriptoj.

Novaj eltrovoj.

Antaŭ mallonga tempo gazetoj raportis, ke s-o Dobkevičius (Litovio) eltrovis novan aviadilon. Tiatia aviadilo diferencigas de ĝisnunaj per sia malgrandeco. Unu homo facile ĝin povas traportati en alian lokon; ĝi estas kaŝebla sub malgrandaj arbaretaj; distance je 40 metroj estas neaŭdebla ĝia bruaĵo; tia aviadilo ankaŭ per tre sufiĉa rapideco disingiĝas.

Kaj nun litovaj gazetoj ree raportas, ke unu litovo en Kaunas estas eltrovinta novajn principojn de grandaj ventaj turbinoj. Unu tia venta turbino povas havi ĝis 150 ĉevalpovoj. Plej bone ĝi iras por elektrostacioj. La konstruado per tute sia malfacileco sin apogas malsupre sur grandaj aŭtomobilaj radoj kaj per sia periferio turnigas la lastajn, kiuj donas la movadon al dinamo. Tuta konstruo staras sur ferej-betonaj muroj, neniaj turoj kaj domoj estas bezonataj, kaj ĝi estas sufiĉe forta, ke kontraŭstaru samajn grandajn ventegojn. Ĉiuj aĵoj por ĝi estas fareblaj en Litovio Tiatipaj elektrostacioj tre malkarigas elektrofaradon. *Kl. Naudzius, Kybartai, Pašias, Litovio*

Pacifismo.

La honora sekretario de la angla movado „Ne plu milito!“ dissendis grandan alvokon kies enhavo ni publikigas tie ĉi, ĉar ĝi estas adreŝita al pacifistoj de la tuta mondo.

Alvoko por Mondo sen Milito.

La junularo respondas al Lord Birkenhead.
Ĉie hodiaŭ la junularo ribelas. La geknaboj, kiuj suferis kaj ankoraŭ suferas, kiel rezulto de la mondmilito, kunigas manojn trans la landlimojn kaj brave komencas konstrui novan civilizacion.

La malsukceso de la plaĝa generacio.

Estas bone por la estonteco, ke la junularo havas sufiĉe da imagoj koncepti mondon sen milito, kaj da fido kaj kuraĝo labori por ĝia realigo.

Niaj pliaĝuloj jetis nin en mondon de milito. Ili havas nenian adekvatan planon por konstrui mondon de paco. Iliaj timemaj skemoj ne kontentigas la ardan entuziasmon de la junularo. La registaroj ankoraŭ elspezas siajn milionojn ekupante armeojn, militŝipojn, kaj aviadilojn.

La registaroj ankoraŭ elspezas siajn milionojn ĉe scienca esplorado — ne por la utilo al la homaro, sed por ĝia detruo. Ĉie estas haoso, mizero, kaj malespero.

Milito ne estas neevitebla.

La junularo vokas al la homaro havi la kuraĝon fini ĉion ĉi, kaj kuraĝe paŝi antaŭen al mondo sen milito.

La junularo asertas, ke la milito ne estas neevitebla.

La junularo asertas, ke la milito povas esti forigita.

La milito estas forigebla per la inspiro al la homoj, ke ili laboru en la spirito de servo anstataŭ en la spirito de avareco, kaj edukigu por starigi internacian klason esprimantan ĉi tiun frataran idealon.

Brilaj premioj.

Statistoj, kiuj vivas en la mondo de hieraŭ, diras ke „la mondo proponas brilajn premiojn al tiu kiu havas fortan koran kaj akran glavon“. Ni diras, ke estas tempo, ke la fortaj keroj de la junularo rifuzu uzti la akran glavajn por gajni brilajn premiojn por ŝtatistoj kaj financistoj. Ni serĉas ne brilajn premiojn por privilegia malmulto, sed oran ŝancon de vivo por ĉiuj.

Junularo de Anglujo — antaŭen!

Konferencoj okazis je la kontinento, ĉe kie miloj da gejunoj el diversaj landoj kunvenis, viglaj per tiu entuziasmo de juneco, kiun nenio povas bridi.

Geŝtatoj de Anglujo, ĉu ni restu malantaŭe? Ni devas kunigi kun niaj kontinentaj kamaradoj por atingi nian pacan idealon.

Ni ankaŭ devas partopreni en la pionira laboro.

Ni devas ne ĉesi ĝis la junularo proklamas — individue, nacie, kaj internacie — Ne-plu-milito.

Sporto.

Skoltismo en Turkujo.

De la jaro 1910 la noblaj ideoj de Baden-Powell ekĝermis ankaŭ en Turkujo. La merito pri la fondo de la unuaj skoltaj organizaĵoj apartenas al sinjoro Sany Bej, homo kun larĝhorizonta kulturo, multe batalinta per skribo kaj parolo por la pacifista edukado de la junularo en Turkujo. La unua volumo de lia verko „Guide de l'éclaircur“ estis presita antaŭ la milito en 1914, la dua kaj tria volumoj aperis en 1922, verkante varman eĥon en la evoluemaj animoj de l' turkaj junuloj.

Dank' al lia energia agado, la nombro de l' organizita Turka Skoltaro hodiaŭ estas pli ol 20000. Ilia populara komandanto estas sinjoro Sany Bej, inspektoro de Fizika Edukado de Konstantinopolo.

La nombro de la konstantinopla skoltoj estas 4000. Ili ricevas oficialan subvencion de 5000

piaŝtoj turkaj poĵare de la registaro en Stambul. Bone redaktita skolta gazeto aperas dusemajne en turka lingvo.

Konsiderante la gravecon de universala lingvo por skoltoj, s-o Sany Bej disponis, ke estu aranĝataj esperantaj kursoj por la turka skoltaro, komence de la nova lerneja jaro en septembro 1924.

T. M.

En Padelboato al Afriko.

Alige ni mia artikoletoj en n-o 180 de ET pri la tolboatveturado ĉirkaŭ la mondo mi povas sciigi, ke la 3 vojaĝantoj estas venontaj je la Nigran maron. Ili estis sisteme grave malhelpitaj pro la muĉta glacio en la Danubo.

Meze de majo entreprenis 4 berlinanoj per metalboatoj esplorvojaĝon en la internon de Afriko. Ili ekveturis de Passau sur Danubo al Nigra maro, laŭlonge de la bordoj de Turkujo kaj Arabio al Nildelo. Post kiam la ekspedicio sur Nil kaj Bar el Dŝebel estos alveninta en Viktoria lago, komenciĝos la speciala esplorvojaĝo, tra Brita Orientafriko, Belga Kongo, Angolo, Rodezio ktp. Oni fiksis daŭron de 4 1/2 jaroj. La ekspedicio estas bone preparita; la partoprenantoj kovras ĉiujn elspezojn, certe ne tro malgrandajn, sole per propraj rimedoj.

La boatoj estas faritaj el plej bona, zinkumita metalo kaj dismetieblas en 6 partojn. Ii havas longecon de 5 resp. 4.50 m kaj larĝecon de 75 resp. 68 cm. En ĉiun boaton estas enkonstruitaj 3 aerejoj, samtempe servantaj kiel pakajejoj. La boatoj pezas ĉ. 25 kg kaj estas ekipitaj per la plej modernaj instrumentoj kaj aparatoj.

Joh Bernhard, München.

Statistiko.

La kosto de l' mondmilito.

En la artikoletoj „La militoj de la lasta tempo kaj aliaj kostoj“ (ET n-o 174) la kosto de l' mondmilito estas kalkulata je 500 miliardoj da oraj frankoj. Laŭ alia fonto, prenata el la murkalendario, eldonita de l' Gosizdat (ruslanda ŝtata eldonejo), ĝia kosto estas eĉ pli granda, nome 250 miliardojn da dolaroj.

Kiom grandega estas la sumo, estas malfacile imagi; jenaj realaĵoj vidigas tion pli klare: 250 miliardoj da argentaj dolarpecoj pezas 7812000 tunojn. Por transporto de tiu ĉi ŝarĝo necesus 3906 vagonarojn po 40 vagonoj. La kunĉenigitaj vagonaroj rezultigus de 3000 km!

Se 250 miliardoj dolarmoneroj estus metitaj unu apud la alia ĉe la ekvatoro, ili ĉirkaŭzonus la terglobon 286-foje. El la fanditaj moneroj oni povus pretigi argentan ekvatoron, 9 m dikan. La samaj dolaroj, metitaj unu sur la alian, formus kolonon, altan je 660000 km, alivorte duoble pli grandan ol la distanco de la tero ĝis la luno.

Kaj fine: se oni dividus la por la milito elspezitaĵajn dolarojn inter ĉiuj teranoj, ĉiu estus ricevinta 170 argentajn dolarojn.

R. L-son, Tallinn.

Diversaĵoj.

Migrantoj al Brazilio.

Vere la brazila registaro proponas faciligojn al familioj, sub specialaj kondiĉoj, kiuj tamen estas tute favoraj al fremduloj.

Por profito duobla estas preferinde, ke ĉiuj, kiuj deziros tiajn informojn, bonvolu sin turni rekte al registara oficejo, laŭ jena adreso: Direktor do Servico de Povamento do Solo — Ministerio da Agricultura (Rio de Janeiro, Brazil), per leteroj skribitaj en Esperanto, ĉar tiel la informoj estas donataj pli precize kaj detale de kompetentaj oficistoj. Tio efike utilis ankaŭ kiel plia pruvo de l' praktika valoro de Esperanto.

O. P., Rio de Janeiro.

Alvoko.

Esperantista Junularo!

Venu dum somerlibertempo al Remscheid (Rejnlando). Per helpo de la tiea popolaliternejo oni aranĝos la unuan Intern. Esp. Junul. libertemp. hejmon de 1 julio ĝis 3 aŭgusto.

Ni ludos, kantos, migros, banos kaj vizitos la multajn natur-, art- kaj teknikovindajn lokojn de tre interesa Remscheid kaj ĉirkaŭaĵoj. Ĉiuj elspezoj estos po semajno ĉirkaŭ 15 ormarkoj. — Por plibonigi lingvolertecon en Esperanto okazos ankaŭ specialaj lernezcercadoj speciale por konversacio. —

Ĉu ne kreskos per tiuj kunvenoj plej bone la grava frukto de Esperantomovado: la pacigo de la nacioj?!

Ĉiujn korespondantojn sendu al la gvidanto de la libertempa hejmo: Jörg Mager, instruisto, Berlin-Neukölln, Kaiserfriedrichstr. 68/4

Varbu abonantojn por ET!

Samideano, kiu intencas viziti la fame konatan bankokan

Bad Kissingen (Bavarujo)

trovas malkaran loĝejon ĉe samideano. Skribu al
H. Neubert, supera poŝtinspektoro, Bad Kissingen.

Gazeto, kiu manku en neniu biblioteko esperantista

INFORMOJ

de Esperanto-Asocio de Estonio.

Ĉiumonate aperante, regule jam pli ol unu jaron (ilustriita, 8-paĝa), "Informoj" liveras al legantoj riĉan materialon, zorgo verkatan de konata samideano, pri Esperanto-societa vivo, organizaĵaj demandoj kaj propagando, lingvajn atencojn, adresojn ktp.

Unika pro sia pure esperanta karaktero!

Konstantaj fakoj: El la Estonia Esperanta movado, Kritiko-Bibliografio, Demandoj k. Respondoj, Faktoj por propagando, diskuteto "Inter ni" (malfermita al ĉiu leganto) kaj ceteraj.

Mendu ŝpecimenon, ne forgesante aldoni respond-kuponon.

Abonkondiĉoj: jare 3.50 sv. fk., duonjare 2.— sv. fk., kvaronjare 1 sv. fk. aŭ la ekvivalentoj per alia mono. — Anoncoj: 1 □ cm 0,05 sv. fk.

Admin. de Esp.-Asocio de Estonio, Tallinn :-- poŝtkesto 6.

La plej malmultekosta libro en Esperanto

Ĉiu devas nepre posedi la libron

Eŭropo ĉe la abismo

de **Francesco Nitti**

iam ministro prezidanto itala

Esperanto-traduko
 kun speciala antaŭparolo de la eminenta aŭtoro.

(Preskaŭ 200 paĝoj.)

Ĝus aperis.
 Prezo 3.— ormarĉoj.
 Mendu tuj!

La libro al privatpersonoj okazos nur post antaŭa pago de la sumo de 3.— ormarĉoj plus sendokasoj de 20 orlenoj po ekzemplero, pagbita en la valuto de la koncerna lando, transskalkulita je la kurso de la borsoj de Zŭriĉ (Revenditoj turnu sin por specialaj kondiĉoj aŭ al ebidono)

Frankfurter Societäs-Druckerei
 G. m. b. H.
Ablg. Buchverlag - Frankfurt a. M.

Korespondo en Esperanto. — Ilustritaj kartoj rifuzataj.

Se vi bezonas Esperantajojn

postulu la riĉenhavan katalogon de —
 niaj multe ŝatataj eldonaĵoj! —

(Lerno- kaj ekzerco- libroj, vortaroj, literaturaj verkoj ĉiuspecaj, insignoj, propagandiloj ktp.)

Abonu nian gazeton Germana Esperantisto!

La plej malnova el ĉiuj ekz. Esp.-gazetoj.
 Ni liveras akurate kaj al ĉiuj landoj.

Esperanto-Verlag Eilersiek & Borel G.m.B.H.
 Berlin SW 61, Wilmstrasse 5 (Germanujo)

Anoncoj.

Anoncoj pri esperantista vivo (masĝino, flangigo, edziĝo, morto, okazontaj gravaj esp. kunvenoj, festoj k.s.) senpage.
 Aliaj anoncoj, nur akceptataj por minimume du sinkvialaj impresoj, kostas po du impresoj kaj 20 vortoj (krom unu adreso) la prezon de ok ET-numero, kontraŭ antaŭa pago. Abonanto, ĉe kiu ni povas depreni la pagon de la abononkio, ĝuas proproja anoncoj preferan prezon de kvin ET-numeroj. Germanoj pagas 3.— mk., pretera prezo por postebonantoj 1.25 mk. Anoncoj devas aŭten 12 tagojn antaŭ publikigo.

MORTO S-ino Berta Agourine, patrino de s-ano J. Agourine, Paris kaj onklino de s-ano J. Sapiro, Bialystok, mortis la 9. 5. 1924 en Bialystok, Polujo. [1]

LETervesPERON ARANĜAS je la 15a de junio j. k. la Junula Esperantista grupo „Esperanto Triumfonta“ en Petriĉ, Bulgarujo. Skribu tiuokaze leterojn kaj il. PK. Ĉiu adreco al s-o Teodor K. Popov, Petriĉ, Bulgarujo. [2]

SOMERA RESTADO. — Vidvino de advokato en Budapeŝt (Hungarujo), 36-jara, serĉas inteligentan kaj bonstanatan familion en estlerlando (kondiĉoj: bela ĉirkaŭaĵo), kiu ŝin abile akceptus por 4-6 semajnojn kiel gaston. Ŝi parolas hungare, france, germane kaj angle. Proponojn sendu urĝe al s-ino Ser-ŝi o Fodor, en Deva (Trensaviano, Rumanujo), str. Prince pele Carol N-o 50. [2]

JOZEFO VASILJEVIĈ REMEZ (ruĝarmeano) malap etnina se posteigne dum militado kun bandoj de generalo Denikin estis serĉata de lia patrino kaj gefratoj. Ŝi petas ĉion konatan pri lia sorto al logoloko komunikita al s-ino Mario Remez, Fontanka 21, Leŝingrado. [2]

GESPERANTISTOJ TUTMONDAJ!, kiuj veturas tra K. m. mo en Ĉeĥoslovakio turni vin al s-o J. Spruŝanský, kiu volonte donos al vi informojn pri anoncado pri pasportoj. Adreso: Josef Spruŝanský, detektivo, Jokaistr. 17, Komarno, Ĉeĥoslovakio. [2]

GEFIANCĜO. Gesp-oj flino Szezepauska kaj s-o Seisade la 9. 5. 24. Flino Foybowna kaj s-o Sziambrowski la 20. 4. 24. [1]

ELDONEJO „ESPERANTISTA VOĈO“, Jaslo (Polujo) po-edanto: S-ŝo Grenka n-p-k-nfeld, liveras ĉiujn esperantajn librojn ktp. Postulu prezaron. [3]

RUSA ESPERANTISTINO serĉas someres'radejon tri semajnojn dum aŭgusto. Ŝi proponu al flino Maria Smotitzki, Berlin-Charlottenburg, Stutigarter Platz 5. (Germa uo) [1]

KORESPONDVESPERON la 15a junio j. k. aranĝas Borislava g uo l. ŝu te „Internacia Humoro kaj Satio“. Ĉiuj partoprenantoj r ĉevos certe respondojn por vesperaj humoroj kaj s-tiratoj, al-entiatj de alilandaj partoprenantoj. Ekste eŭropojnojn ankaŭ ni tre invitas. Adreso: S-o R. Wluczek, „Kasa Chroych“, Boryslaw, Polujo. [1]

KIU PRINTOS el pola studento 80—100 dolarojn por plibonigo de la monĝio (denoj). Li redonus tiun ĉi sumon-duan jaro. Oiertion bonvolu sendi al St. Kowalewski p. a. Vizekonsulat der Republik Polen, Schneidemühl, Germanujo. [1]

ATENTU! Mi sciĝas la tuimondaĵon gesamideanon, ke pro diversaj kialoj mi estas devigata ĉesigi la korespondadon. A. Maudič, Fiume. [1]

ATENTU, SAMIDEANOJ! Ni aranĝos letervesperon la 30a junio por havigi al ni korespondantojn. Bonvolu adresi al Esperanto-Fako de Tutestonia Gejumulara Unuigo, Piekk iän 69, Tallinn, Estonio. [1]

BRITA ESPERANTO ASOCIO, 17 Hart Street, London W. C. 1, deziras aĉeti n-on 2 de „Esperanto Triumfonta“, ankaŭ „British Esperantist“ (Volume II, 1906). [1]

NUR 5 sv. fk. ENSENDU kaj vi ricevos 120 diversajn polajn poŝtmarkojn. Ni forsendas ankaŭ pm. elektojn post ricevo de plej bona referenco aŭ mendepono. Eldonejo „Esperantista Voĉo“, Jaslo (Polujo). [3]

SAMIDEANOJ TUTMONDAJ! Helpu al mi arangi en nia loko esperantan ekspozicion por ke ni pruvi al urbanoj, ke nia lingvo vere estas tuimonda. Sendu libretojn, gazeton PM, PK, entute esperantajojn — precipe vi ekster-eŭropanoj laŭ adreso Rudolf Sigl, Daruvar, Jugoslavio. [1]

SAMIDEANOJ HELPU! Por sukcesigi esperantan propagadon inter lernantoj de arbura lernejo, ĉiuj helpemaj samideanoj estas petataj sendi malnecesajn por ili apartajn numerojn de esperantaj gazetoj, ĵurnaloj ktp. al Lesnaja Skola, legejo de lernantoj, Toŝima de Vologda gubern. Rusujo. [1]

Korespondo kaj Interŝanĝo.

S-o Petro Boĉkov de Jambol (Bulgarujo) de decembro 1922 estas en Argentino. Suda-Ameriko. Liaj korespondantoj povas skribi al Pedro Boĉkov, Nueva York 4640, Berisso, F. C. S. Argentinio. Li deziras interŝanĝi il PK kun novaj gesamideanoj. [2]

20-jara fraŭlo deziras korespondi per il. pk. kun tuimondaj fraŭlinoj. Skribu al s-o Alois Reithauer, Landstr. 2.2/10, Heimbürg, Aŭstrio. [2]

S-o Herman Sjahre. S. Strandgat. 24, Gävle, Svedujo, deziras korespondi per il. pk. kaj leroj. [1]

S-o Ĉefmarŝalo Luigi Rubetti, Distretto Militare, Udine, Italia, interŝanĝas pm. nur kun seriozaj gelektoj tuimondaj. [2]

Rusa fraŭlo, 21-aĝa, amanta la naturon, ne ŝatante la vivon, libera de iuj ani superŝticioj, iomete poetema, interkantanta en proksima estonteco komenci transmondan vojaĝon — deziras korespondi kun junaj gefraŭloj de diversaj landoj, celante krei amikecon kun kelkaj personoj. Peto en unua lero, skizi sian personon de ĉiuj flankoj. Adreso: S-o Aleks. Novokreŝĉenov, por Mikaelo Malijeĥ, Geloznodoroŝnaja ul. 51, Serdobsko, Saratova gubernio, Rusujo. [2]

S-o M. Gyakushi, Yakusen, Toyama, Japanujo, deziras korespondi kun la tuta mondo per il. PK kaj l. [2]

S-o Mikolao Wieremiecko, poz. Snow, pow. Nieswiezki, fol. Tarekji, Polujo, deziras korespondi per il. PK, PM po 50—100, papermonon, kun la tuta mondo. Respondos ĉiam. [2]

S-ano Johano Dancza, VIII. Szülz. str. 9. 1. 16., Budapeŝt, Hungar., deziras korespondadi kun la tuta mondo pri fakoganoj kaj socialista parti-organoj. Nur tiuj skribu, kiuj partoprenas ie laborista movado aŭ bone konas ĝin. [2]

Mi deziras interŝanĝi PM kun Turkujo, Balkanŝtatoj, Jugoslavio, Aŭstrio, Polujo, Rusujo, Estonio, Latvio, Litovio, Finnlando, Italujo kaj ekster-eŭropanoj ŝtatoj. Mi nur respondos al seriozaj sendaĵoj de minimume 100 ekzempleroj. Liaĉezire mi resendas laŭ katalogo Yvert kaj Teller. Adreso: W. L. F. van der Have, Gaelsstraat 6, Haarlem, Nederlan o. [5]

S-o Leon Ringler, „Premier“, Boryslaw, Polujo, deziras korespondadi kun eksterlandaj petrolfizistoj, ĉiam lui respondos. [2]

Kiu belga, franca aŭ holanda esperantista familio akceptos min dum du semajnoj en aŭgusto kiel paganta gasto? E K-ind, telegrafa inspektoro, Del. U. E. A., Euskirchen. Oststr. 28 II (Germanujo). [2]

S-o Kurt Röller, instruisto, Hartmannsdorf, Bez Zwickau l. Sa., Germanujo deziras interŝanĝi il. PK kun gesamideanoj de la tuta mondo. Respondo estas devot! [2]

Tomilov Anatolij, Uprofburo, Petroŝiskij Zavod, Zabajkalskoj Rusujo deziras korespondadi kun eksterlandaj gesamideanoj k. ĉ. l. per l. P. K., P. M. (b. l.). Ĉiam respondas. [1]

„Esperantistoj deziras korespondadi pri temojn: Jordan Jolin, deziras korespondadi pri „Elektrotekniko la mirindaĵoj de la scienco“. Georgi Sviitov — „Kiamianere liberigos l'homaro“. Petr Ra ĉev — „Elektrotekniko kaj Radioelektniko“. Georgi Volev — „La animo kio estas“. Dimitr Filipov — „Vapormaŝinoj kaj vaporkaldronoj“. Dimitre Avramov — „La vivo ĉi estas reciproke helpado“. Aŭ b-lalado“. Nikolaj Liubomirov — „L'amo kio estas“. Adsojn de ĉiujn: „Sr. Oj III kurso, Telegrafa poŝtensko uĉiŝtice, Sofio, Bulgarujo.“ [2]

F-lino Jeanné Morrisen, Happaertsstraat 5, Antwerpen (Belgujo), deziras korespondi pri la ĉiutaga vivo. Nepe respondas. [1]

S-o Lejour, Dambregesstraat 259, Antwerpen (Belgujo), deziras korespondi per leroj kaj il. PK. [1]

Belga samideano, en Ameriko deziras korespondi. S-o John Huybers, p. a. T. W. Turner, River Road, Newport-news, Virginia (U. S. A.). [1]

S-o Georges Vermeulen, Quai des Etats Unis 6, Liège (Belgijo) deziras korespondi per il. PK. kun la tuta mondo. [1]

S-ino Leonie Van de Meerŝche. Veerstraat 42, Dendermonde (Belgijo), deziras korespondi per il. PK kun la tuta mondo. [1]

S-o Antoine De Vilder, komercisto, Zele (Belgijo), deziras korespondi per il. PK kaj leroj; ankaŭ interŝanĝi PM kun gesamideanoj el ĉiuj landoj. [1]

S-o Joseph Claes, instruist-studento, Ledeganckstr. 8 Gent (Belgijo), deziras korespondi kun la tuta mondo per PK PM kaj leroj en Esperanto aŭ franca lingvo. [1]

S-o Fiŝman, Republikstr. 78, en Panevezys (Litovio), deziras interŝanĝi PM kun Balkano, Rusujo kaj Ekster-eŭropo. [1]

S-o José Salom Nadal, intervilaĝo vojo de la montaro 82 (Malborea), Sia de na Tesa, Hispanujo, deziras korespondi nur kun fl-linoj de la tuta mondo per il. PK (bfl). precipe el Japanujo, Siberio, Hindujo, Hinujo kaj Palestino. [1]

Mi deziras interŝanĝi PM kun la tuta mondo. Aleksander Pakkane, Jöbvi, Narva tian 53, Estonio. [2]

S-o Ludoviko R-ĉek, Erzsebet-u. 38, Ujpest, Hungarujo, volas korespondadi kun gekamaradoj el tuta mondo. Interŝanĝas PK, PM kaj papermonojn. [1]

Gesamideanoj ĉiulandaj, atentu! Juna 22-jara fraŭlo, popol-instruisto, deziras korespondadi pri pedagogio, psilogio, filozofio, religio kaj popolivivo kaj prop-nas interŝanĝon por propraj esperantaj versajoj kun poetoj de la mondo. Adreso: A. Novokreŝĉenov por Serafimo Davidov, Jeleznodoroŝnaja ul. 51, Serdobsko, Saratova gubern. Rusujo. [1]

Mi deziras interŝanĝon de PM kun la tuta mondo. Mi korespondas per angia kaj franca lingvo. Sendu al s-o A. Osterloh, Magdeburg-Wst., Ebendorferstr. 18, Germanujo. [1]

Esperantistoj!

La malgranda „GRUNDKA“ skribmasino estas la skribmasino de ĉiu Esperantisto.

Tre solida - Duobla komutado
 Aŭtomata kolorrubanda bobeno
 Kaŭĉuka rulilo

Skribado lernebla en 1/2 horo.

Prezo nur 8 usonaj dolaroj!

Skribu al
Fred Falk, Auerbach in Hessen Germanujo.
 - Serĉas reprezentantojn en la tuta mondo. -

FOIRO DE GIJON - HISPANUJO

internacia kaj oficiala specimeno okazos de 15—31 aŭgusto prezidita de lia reĝida moŝto Princleno de Asturias.

Esperanto estas oficiala lingvo de la foiro.

Petu informojn en Esperanto kaj broŝurojn de la foiroficejo

FERIA DE MUESTRAS ASTURIANA

Libertad 19 y 21 GIJON - Hispanujo

Oni ne pagos limimpostojn pro la specimenoj

Jus aperis! Adam Mickiewicz **Jus aperis!**

Improvizacio de Konrad

dua eldono en majstra traduko
 - - de R. J. Dobrzański - - -
 deklamota dum la XVI-a Kongreso de Esp. en Wien

Prezo: sv. fk. 0.25

Eldonejo Esperantista Voĉo, Jaslo (Pollando).